Reveno al pasintaj tempoj

Viglo

La aŭtoro, ĵurnalisto kaj (laŭaĝe iama) gimnazia instruisto – interalie elpensinto de tre efika intrumetodo pri historio – per sia debutromano celas revivigi la etoson de Florenco dum la magia epoko de Renesanco, kiam la sinjoreco De l' Mediĉoj akirigis al tiu urbo sian maksimuman brilon kaj la pentristo-sciencisto-inventisto Leonardo da Vinĉi tie aktivis. Aranĝita kiel rakonto de la ĉefrolulo al sia filo Leonardo, la verko strukture samas al krimromano – fakte eĉ priskribas la murdon de Juliano De l' Mediĉoj per la Konspiro De l' Padzoj kun la sekvaĵoj – dum Paolo iom post iom malkovras kiu estas lia vera patro. Tute fascina la ideo prezenti, per sonĝoj de Paolo, kelkajn inventojn el la escepta menso de Leonardo, kiel rezultas projektitaj en liaj studoj, kiuj certe antaŭenigis la estonton. Krom submarŝipoj kaj dragiloj estas menciitaj eĉ eksplodbomboj, kiuj "disiĝis en dekojn da akraj metalaj pecoj". Ĉiama gvidfadeno estas la enamiĝo de Paolo en vico da eventoj kulminantaj je la fino, vera teatrofrapo. La instruan celon de l' verko pri la pasinta epoko evidentigas la mallongaj ĉapitroj kaj la kurteco de la frazoj: sed tia strukturo, eble taŭga al la karaktero de l' verketo, miaopinie ne kongruas kun la malrapida tempo-ritmo de la Renesanco. La tradukistino, Benata Hengelmengel-Koopmans, simpatie enmetis tipajn esperantismojn celantajn al agada plifortigo, reliefigo: "terure teruriĝi" – " trumpetoj trumpetis kaj sur tamburoj oni rultamburis" sed pro tio, eble, esprimo kiel "rakontis al mi la rakonton" iomete … misagordiĝas. Notinda la vortlisto kun klarigoj, nepre necesaj por kompreni apartajn itallingvajn nomojn, en la teksto esperantigitajn. Permesu nur du precizigojn. – dum feŭdala epoko, Senjoreco [Signoria] estis en Italio sistemo por regi <la bienon, la feŭdon k la jurisdikcion> (NPIV p. 1023) en kelkaj urboj fare de la Senjoro, elvenanta el la plej elstara aŭ forta familio de la urbo, kiu al si mem havigis ĉiun povon, eĉ plutenante la instituciojn de la antaŭa Komunumo. Do, Senjoreco ne estas "(= magistratano)" sed konsistas el tuta aro da homoj regantaj urbon, laŭ senjora volo. Fakte tiu konstruaĵo en la ĉefa placo de Florenco nomiĝas "Palaco de la Senjoreco" aŭ alimaniere "Palaco Vekjo" [Palazzo Vecchio] ĉar starigata dum la jaroj 1200 kiel Komununa sidejo. – laŭ la vortlisto, ĉompi signifus "lignaj ŝuoj, lanlaboristoj". El kie venas tiu aldono "lignaj ŝuoj" ne eblas diveni: ĉu el la … tipaj laborŝuoj ĉe nederlandanoj? Ĉompi estas nur la propra nomo de lanlaboristoj en mezepoka Florenco kaj ŝajne devenas el la ritmaj piedmovoj fare de laboristoj en la basenoj por kolorigi lanon. En aziaj landoj eĉ nuntempe oni simile agas por tinkturi ŝpinaĵojn kaj iam ankaŭ vinberoj estis perpiede dispremitaj en la tinoj dum vinrikolto. Tiutempe la ĉompi, samkiel ceteraj popolanoj de malaltaj klasoj, ne rajtis partopreni en la politika vivo, traktitaj preskaŭ kiel nun la hindaj netuŝebluloj: pro tio ili ekribelis en 1378 [tumulto dei ciompi] por akiri rajton estigi interalie novajn korporaciojn de salajruloj. Ŝajne, temas pri iniciatinta sindikata batalo, kvar jarcentojn antaŭ la organizo de sindikataj en Eŭropo! Belaj ilustraĵoj de Miroslava Tomečková agrable dispartigas la tekston, kiel komento al gravaj eventoj. Se preterlasi iujn limojn, la verketo de Hans Ulrich kapablas porti nin, dum kelkaj agrablaj horoj, al aliaj tempoj.



Hans Ulrich
Paolo, la lernanto de Leonardo da Vinĉi
Dobřichovice, 2008
109 paĝoj, 20 cm
€ 9.90
ISBN 9788087169018